Brandenburga Pordego

La Brandenburga Pordego (Brandenburger Tor) staras ĉe la okcidenta enirejo de la malnova Berlino kaj estas la ĉef-monumento de la urbo. Ĝi memorigas pri la propileoj de la Akropolo en Ateno.

La konstruaĵo estas la finaĵo de la strato *Unter den Linden (Sub la Tilioj)* kaj anstataŭigis la unuan Brandenburgan Pordegon, kiu estis konstruata samtempe kun la doganmuro en 1734. Ĝi altas 26 m, vastas 65,5 m kaj profundas 11 m. Ĝi havas kvin traveturejojn kaj du pordegdomojn.

La prusa reĝo Frideriko Vilhelmo la 2-a konstruigis la Brandenburgan Pordegon ekde 1788 ĝis 1791 fare de Carl Gotthard Langhans laŭ fruklasikisma stilo. En la jaro 1793 oni metis sur ĝin la kvarĉevalan ĉaron (Quadriga) kun la venko-diino de Johann Gottfried Schadow. Tiuj figuroj estas faritaj el kupro.

En 1806, ĝi estis forprenita al Parizo fare de Napoleono kie oni volis ĝin starigi, sed antaŭ tio fariĝis, li estis senpotencigita kaj la Quadriga revenis al Berlino, kie oni unue renovigis ĝin. Tiam ĝi ricevis kiel novan potenc-simbolon la feran krucon, sur kiu sidas la aglo de la imperio. Ĉar ĝi revenis al Berlino, ĝi estis starigita rajdante en la urbon (male al la antaŭa direkto).

Ĝis la eksiĝo de la germana imperiestro, nur li rajtis veturi tra la meza arko. Dum la dua mondmilito oni faris de la Quadriga reproduktaĵon el gipso. Ĉar dum la batalo pri Berlino germanaj soldatoj pafis multfoje al ĝi, post kiam oni tie levis ruĝan flagon, ĝi estis ege damaĝata. Nur du ĉevaloj travivis la atakon.

Tial, la figuraro devis esti rekonstruata. Je la 21-a de septembro 1956 la Berlina estraro decidis rekonstrui la eksan urban pordegon. Ambaŭ partoj de Berlino kunlaboris pri la rekonstruado, kiu finiĝis je 14-a de decembro 1957.

Post la konstruado de la Berlina muro je la 13-a de aŭgusto 1961 la konstruaĵo estis en la barita areo kaj povis esti trairata nek de okcidento nek de oriento.

Preskaŭ ĉiuj gravaj okazaĵoj de la Berlina historio rilatas al la Brandenburga Pordego kiel ŝtata kaj urba simbolo. Ekzemple diris la usona prezidento Reagan la 12-an de junio 1987 dum vizito al Berlino antaŭ la Brandenburga Pordego: “Sinjoro Gorbaĉovo, malfermu ĉi-pordon! Sinjoro Gorbaĉovo, malkonstruu ĉi-muron!” (“Mr. Gorbachev, open this gate! Mr. Gorbachev, tear down this wall!”).

28 jarojn post la konstruo de la Berlina muro, ĝi remalfermiĝis je la 22-a de decembro 1989.

La pordego montriĝas sur la malantaŭa flanko de la germanaj eŭro-moneroj 10-, 20- kaj 50-cendaj kiel simbolo de dividiĝo kaj reunuiĝo.

Retpaĝo: www.traduki.de
Teksto: eo.wikipedia.org/wiki/Brandenburga_pordego